



BULLETIN MENSUEL

Organe de la Fédération Espérantiste Normande

ÉDITÉ PAR LE GROUPE DE ROUEN

NORMANDA STELO.



Rédaction & Administration


MM. Liébard et Leroux


41, rue de la Vicomté, Rouen

Abonnements

Un an 2 fr. 0,80 spm.)

Un numéro 0 fr. 20





CORDONNERIE DU PALAIS
Chaussures de Luxe et de Travail

V^{re} A. HERMEL
1, Rue Rollon, 1 -:- ROUEN

ESCOMPTE 5 0/0 AUX ESPÉRANTISTES

FOURNITURES GÉNÉRALES POUR CAVES
MACHINES A RINCER ET BOUCHER LES BOUTEILLES
PORTE-BOUTEILLES ET ÉGOUTTOIRS

Porte-fûts robinets, cire, capsules, etc.

Maison DUVAL Frères
V^{re} G. DUVAL et H. SCHEFFER, Suc^{re}

18, rue Alsace-Lorraine, ROUEN. - Tél. 9.54

Ateliers de Fabrication et de Réparation

55, 57, rue des Augustins

A cette adresse : Magasin de vente d'Articles de Laiterie

A LA NOUVELLE MAISON
Anciennement **A LA MAISON D'OR**
54, Rue d'Amiens, 54

A. GORAT
196, 198, 245, Rue Eau-de-Robec - ROUEN

Matelas, couvertures, tapis, vente et achat de mobiliers

MEUBLES Neufs et d'Occasion

AMEUBLEMENTS EN TOUS GENRES

Maison de confiance. — Ne pas confondre

Bien s'adresser à la « **NOUVELLE MAISON** »

**MACHINES A BRIQUES
ET CALIBREUSES**

Maison C. LAPIERRE
Henri CATHERINE, Successeur

39, rue du Faubourg-Martainville

près le Champ-de-Mars

— **ROUEN** —

Grands Magasins DU LINGOT D'OR

60, 62, 64, rue du Bac et rue des Fourchettes, ROUEN

Nouveautés, Ameublements en tous genres, Confections pour hommes et jeunes gens, pour dames, fillettes et enfants, Chaussures, Chapellerie, Lingerie, Bonneterie et Parapluies. Articles de Chauffage et d'Eclairage, Faïence et Porcelaines, Horlogerie, Bijouterie et Glaces.

Capital 60 millions **CRÉDIT DU NORD** 15 millions versés

SIÈGE SOCIAL A LILLE

SUCCURSALE DE ROUEN, 68, rue Jeanne-d'Arc (en face la Poste)

Escompte et Banque. — Achats et Ventes de titres. — Paiements de tous Coupons. — Location de Coffres-forts depuis 5 fr. par mois. — Garde de Titres.

Grand assortiment de Nattes,
Chignons mode bouclés et nat-
tés, Crépons réclame Cheveux
premier choix. Parfumerie à
prix très réduits

MAGASIN DE CHEVEUX
A^{me} Maison MARTIN, P. JEAN, Succ^r

15, rue Grand-Pont, ROUEN - TÉL. 68

Garage Robert CROIS
ROUEN

Rue du Donjon (Tour Jeanne-Darc)

TÉLÉPHONE 1317

Agence **BERLIET-PANHARD**

Pneus **MICHELIN**

A LA VILLE DE LIMOGES

Ch. VILLOUTREIX, 29, rue Écuyère

Grand choix de Porcelaine riche et
ordinaire, à des Prix très modérés. —
Services de table, à Dessert, à Gâteaux,
à Fraises. — Services à Café, à Thé, à
Liquieur. — Déjeuners, Tête à tête, Sta-
tuettes, Vases, etc.

SPÉCIALITÉ de BLEU DE SÈVRES et INCRUSTATIONS

"Normanda Stelo", 41, rue de la Vicomté, Rouen

Grâce à l'ardeur des ESPÉRANTISTES pour leur langue
LES ANNONCES DE "NORMANDA STELO"

sont lues aux quatre coins du Monde, cependant, leur prix est des plus modérés

1 page, une fois 20 fr.; un an 200 fr.	1/4 page, une fois 8 fr.; un an 80 fr.
1/2 page " 12 fr.; " 120 fr.	1/10 page, " 3 fr.; " 30 fr.

SAMIDEANOJ !

Por praktike propagandi Esperanton, postulu ĉe via spicisto la kafojn kaj teojn de la *Havra Esperantista Komercejo*, kaj speciale ĝian markon de rostita kafo "Bona". Se vi petos ilin vane, informu la Generalan Agenton kaj Deponiston de la firmo.

Sinjoro A. TERNON, 6, rue du Repos, Paris, kiu zorgos la aferon.

Reprezentantoj havantaj klientaron estas bezonataj

A LOUER

MAISON DES ABEILLES

La plus grande Maison de Vêtements de Normandie

21 23, 25, Rue de la République

ROUEN



Exiger sur tous nos Vêtements la vignette portant la marque
ci-contre qui est une garantie d'élégance et de solidité

ÉNERGIE & LUMIÈRE

17, rue Jeanne-Darc

ROUEN ☼ ☼ ☼ TEL. 14-11

ÉCLAIRAGE par tous systèmes

..... Electricité. Gaz, Essence

Lampe « KLAROS », à filament métallique

FORCE MOTRICE

.... Installation. Dynamos, Moteurs

CIDRES, BOISSONS de CIDRE

fermentés, prêts à boire ou sortant du pressoir, pour bouillir en cave au gré du client.
Petites et grosses provisions.....

MAISON DE CONFIANCE

BRASSERIE DES PRAIRIES ST-GERVAIS

Léon TÉNIÈRE

99, Avenue du Mont-Riboudet, ROUEN

BELLE JARDINIÈRE, M^{on} LEGRAND, Frères

52, rue Jeanne-d'Arc, rue Grosse-Horloge, 105, ROUEN (Téléphone 5.31)

Habillements tout faits et sur mesure, tailleurs Hommes et Dames

ANNEXE : rue Jeanne-d'Arc, pour la Cravate, Cois, Bretelles, Ganterie, Parfumerie, etc.

Remise 5 % aux Espérantistes, sur présentation de leur carte ou de leur insigne

GALVANISATION ROUENNAISE

Rue de la Ferme prolongée

TÉLÉPH. 14.37

GALVANISATION À FAÇON

E. GOMICHON

PLAQUES ÉMAILLÉES EN TOUS GENRES

TÉLÉPHONE 14.37

18 et 20, Rue Lafayette — ROUEN

TÉLÉPHONE 14.37

Cours d'Esperanto 1912-1913

Coutances. — A l'Hôtel-de-Ville, Professeurs, MM. RUVAULT et CADIOU. — Cours tous les dimanches, de 17 à 18 heures.

Le Havre. — 1^{er} Sous le patronage de la Municipalité, à l'Hôtel-de-Ville (Salle I), Professeur, M. VAUTIER, le Mercredi, à 20 h. 45.

2^o Préparation au Concours Général d'Esperanto (jeunes gens), à l'Ecole d'Hydrographie, place Marais, Professeur, M. MESNY, le dimanche à 10 heures.

3^o Préparation au Concours Général d'Esperanto (jeunes filles), à l'Ecole Pratique d'Industrie, rue du Lycée, Professeur, M^{lle} MAYER, le jeudi à 10 heures.

Louviers. — A l'Hôtel-de-Ville, sous le patronage de la Municipalité, Professeur, M. BONTEMPS.

1^o Le dimanche de 16 h. 1/2 à 18 heures, cours spécial pour jeunes filles ;

2^o Le lundi, de 20 h. 1/2 à 22 heures, cours pour les jeunes gens.

Rouen. — 1^o Sous le patronage de l'Union Philanthropique, le jeudi à 20 heures 1/2 par M. LEROUX, Ecole Pouchet, rue Thouret.

2^o Un cours élémentaire en 10 leçons, sous le patronage et au siège du Groupe Espérantiste, 41, rue de la Vicomté (2^e étage), le jeudi après-midi de 14 heures à 15 heures. Ouverture le jeudi 21 Novembre. Ce cours est public et gratuit.

3^o Un cours supérieur réservé aux membres du groupe, le vendredi à 20 heures 1/2, salle des cours, 41, rue de la Vicomté.

Il est rappelé à cette occasion que 20.000 francs ont été offerts par M. Michelin, pour être distribués en prix aux élèves des cours d'esperanto, ayant moins de 19 ans au 1^{er} janvier 1913. Le concours aura lieu à Pâques 1913. Nous engageons donc vivement les jeunes gens des deux sexes à se mettre sur les rangs.

PAROLADVOJAGO : Profesoro Aug. Pitlik decidigis entrepreni vojaĝon por atentigi pri la Ĉefurbo de reĝolando Bohemujo Praha. La temo, akompanata de 120 artiste koloritaj lumbildoj de la plej fama bohemo pentristo Špillar, altiros atenton de ĉiu gasto. La Grupoj kiuj deziras profiti tiun okazon sin turnu letere al S^{ro} Prof. Aug. Pitlik, Praha III, Jansky vršek 3 (Bohemujo). La prezo fiksitita por unu parolado estas 17 spesmiloj. La reklamelspezoj, ĉambrego, lumo. k. t. p. estas pagotaj de la grupo, kiu prizorgos ankaŭ la aparaton por lumbildoj. Sendu mendojn antaŭ la 15^a de Novembro.



La plej bela rozarbo de Francujo ekzistas en Normandujo, ĉe la pastro de Dompierre (Orne).

Tiu giganta rozarbo estas greftita antaŭ dekok jaroj sur tre malvigla sovaĝrozarbeto. Ĝi estas alta po 2 metroj, ĝi formas laŭbon tiel densan ke la sunradioj ne povas trapenetri.

Plantita meze de korto tro mallarĝa por ĝia ne satigebla vegetado, ĝi kovras la tutan spacon je ĉirkaŭ 100 kvadrataj metroj; 200 kunmanĝantoj povus kune sidiĝi en ĝia ombro. La trunketo havas ekzakte 42 centimetrojn apud la greftaĵo. Ĝia kapo, fungforma aŭ pli bone ombreforma, estas subtenata per stangoj longaj je 10 metroj kaj horizontale plektitaj sub ĝia neordigebla hararo.

La multaj rozistoj kiuj ĝin ekzamenis ne tre scias al kiu familio ĝi apartenas. Ĉio kion oni konas pri ĝia deveno estas ke ĝia avo estas alportita el Portugalujo de Alençon'a vojaĝanto.

La abato Dubois, feliĉa posedanto de tiu fenomenaj rozarbo, kiun li mem greftis, kaj kiun li kulturas per jaluza zorgo, nomas ĝin simple : « Mia giganta rozarbo ».

BIBLIOGRAFIO

POR ESPERANTO - H. Sentis, Grenoble; Ne aĉetebla sed ricevebla postulante ĉe la aŭtoro boul Ed Rey 17, Grenoble. Poezioj eldonitaj kiel propagandilo.

La aŭtoro estas konata de la Esperantistaro ĉar de la momento de la skismo de Ido li proponis ke por eviti ke multaj anoj de Esperanto estu allogataj de trompaj promesoj oni ekzameni trankvile, kaj provis saĝe kelkajn reformetojn.

De tiu tempo li eldonis ĵurnaleton : *Esperanta Evoluo* en kiu li kaj kelkaj partianoj de lia ideo ekzamenis kaj provis la ŝanĝetojn kiujn ili opinis utilaj.

La averto de la broŝuro « Por Esperanto » montras kelkajn el la reformoj. La aŭtoro forlasis la mezuran *da* kaj la akuzativon post prepozicio, ĉar neutilaj. Li akceptis la dividon de la prepozicio de inter *di*, de, *da*.

Kiel oni diras « iu, neniu », en lia ĵurnalo S^{ro} Sentis diras « aliu ».

Li ankaŭ diras « ankore, anstata, anke », k. t. p.

Li deklaras ke okaze li ĉerpas, en la Ida vortaro, vortojn, kiuj mankas en la nia, ĉar, li diras, vorto apartenas al ĉiu kiu *agnoskas* ĝin ĝusta.

Malgraŭ tio lia lingvo restas Esperanto. Precipe oni ĝin komprenas, dum oni estas tute trompita de la pluresigno per N de Kosmopolito, aŭ per I de Ido.

Hungaroj rakontoj, de Ferene Herczeg (N^o 21 de Esperanta biblioteko internacia - Berlin 0 fr. 25). Tiu libreto daŭrigas la serion de tiuj jam publikigitaj de la librejo Ader kaj Borel, Linden-Strasse 18-19, Berlin. Ni jam havis okazon diri kiom utila kaj interesa estas tiu biblioteko, kiu dank'al esperanto konigas al ni diversajn modelojn de fremdaj literaturoj. Pro la malkara prezo kaj malgranda formato de siaj libretoj ĝi devas esti nepre ĉe ĉiuj esperantistoj.

G. G.

Pri esperanta literaturo, de Ed. Privat (*Hachette, Paris, 0 fr. 75*). — Cette brochure qui doit être dans les mains de tout espérantiste est la reproduction du merveilleux discours prononcé par M. Edmond Privat, au Congrès d'Anvers. Il expose comment une langue croit et se développe en évoluant sans cesse et il fait voir que depuis plus de 20 ans, l'Espéranto par sa littérature est aujourd'hui une langue vivante ayant les mêmes qualités et le même caractère que les autres langues. La pureté et l'élégance du style en même temps que l'élévation des pensées exprimées, en font l'une des meilleures brochures écrites sur l'Espéranto.

G. G.

Versaĵoj, de Georgo Deŝkin (*0 fr. 25 Eldonita de Editura esperanto, 44, str. Belvedere, Bucaresti*). — Kolekto de dudektri kantoj verse kaj originale verkitaj en korekta stilo, kiuj malgraŭ la ĉiama temo, kara al la poetoj : amo, malespero k. t. p., estas tamen interese legindaj. Cetere kiel diras la aŭtoro : « Ne demandu poeton por kio li verkas ; per kantoj li vivas, liaj kantoj estas li mem.

G. G.

Cours élémentaire pour apprendre l'Espéranto sans professeur, par Marcelle Fauvart-Bastoul (*Librairie Hachette, 1 fr. 50*). Ainsi que le dit dans la préface, M. le Recteur Boirac, ce livre contient, sous son format restreint, une explication très exacte et très lucide des principes fondamentaux du vocabulaire et de la grammaire. Il présente en 11 leçons, tout ce qui est nécessaire à l'étude de la langue ; nous n'y relevons qu'une omission relative à la règle de l'accusatif de clarté ou attribut (Mi trovis la vinon bona). C'est un excellent manuel que nous sommes heureux de recommander.

G. G.

Portreto, de N. V. Gogol, tradukita de D^{ro} Andreo Fiŝer (*Preso Esperantista, Paris, 1.25-0.50 sm.*). — Tiun verkon de la fama rusa verkisto Gogol tradukis en Esperanto D^{ro} Fiŝer. Tiu portreto, kiu prezentas la vizaĝon de homo havanta eksterordinarajn okulojn, havas diablan efikon sur ĉiuj ĝiaj posedantoj. La epizodoj de tiu

rakonto ne nur interesos la legantojn, sed ankaŭ la bonega kaj tute pura stilo de la traduko utilos multe al ili. Ni do senhezite ĝin rekomandas al niaj legantoj.

Ni nur rimarkigos kelkajn esprimojn : « karoso (carrosse), onidiroj (des on-dit) » kaj la kutimon de sinjoro Fiŝer uzi izole kelkajn sufiksojn laŭ speciala maniero : « li *ekis* ĝin atente rigardi (anstataŭ ekrigardis) — li *ekis* preni — ŝajnis kvazaŭ *eke* kaj subite reviviĝus — lunbrilo *adis* kuŝi sur tegmentoj — *ade* sin demandante — kiu ĝin *indas* ; li *ekis* rapide marŝi (il se mit rapidement à marcher), kies senco estas malsama ol : « li rapide ekmarŝis (il se mit à marcher rapidement). » G. G.

Presa Esperantista societo, 33, rue Lacépède, Paris. — Ĝus eldonis kelkajn broŝurojn kiujn multaj esperantistoj deziras konservi.

1^o Raporto pri la Sepa Kongreso, Antverpeno 1911 de Era, prezo 0.500 sm. — Tre kompleta kaj kritika, eĉ humora recenzo de tiu kongreso.

2^o Du paroladoj de Edmond Privat, prezo 0.40 sm. — La temoj estas Vivanta lingvo de Vivanta popolo kaj Pri la vivo de Esperanto kun antaŭparolo de prof. Cart. de Ĉiuj jam legitaj sed ĉiam relegindaj.

3^o Kara panjo komedio en unu akto de **Walter Cordon** tradukita de **Gego**, prezo 0.500 sm. — Agrabla skizo de la maloportuneco de ĉeesto de bopatrino ĉe novedziĝinta paro. Malfeliĉe nura traduko ; la temo estas surfiĉe facila por ke oni povu esperi originalojn. — La tradukinto maltrafe uzas « ĝi » anstataŭ « tio » ; cetere la traduko estas en bona prozo.

4^o Tri Mortoj de Leo Tolstoj traduko de **Ŝedlovs kajr**, prezo 0.16 sm. — Kun portreto de Tolstoj. G. P.

Esperantist Abel n^o 19. — **Kristo ĉe la festo de Purim**, de **Johano Bovio**, unuakta dramo, tradukita de **A. Tellini**. Bologna-Italujo (sm. 0.20). — Rakonto rilata al la historio de Jesuo kaj hebreaĵoj de tiu epoko.

Esperantiska Abel n^o 20. **Komparo**. Traduko de **A. Tellini** laŭ itala lingvo (0.40). — La paĝoj de tiu-ci broŝureto estas eltiritaj de « Toskanaj proverboj » de Jozefo Giusti. Tio permesas la komparon kun similaj paĝoj de ĉiuj lingvoj, kaj la tradukanto, deziras ke per esperanto aperu internacia verko pri tiu temo.

G. G.

STUDETETO PRI LA PREPOZICIOJ

por



pro



La unujn oni nutras *POR* lia robo kaj *PRO* lia robo la alianj

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita en 1895.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta post la 15. de ĉiu monato.

Ĉefredaktoro : TH. CART

Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)

JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto Beletristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj.

Ĉefredaktoro : *Paul de Lengyel*. Direktorino : F-ino C. Royer.

Jara abono : 2 fr. 50 (1 Sm.)

Lingvo Internacia kaj *Juna Esperantisto* kune :

6 fr. 25 (Sm. 2,50).

Post la 1. Januaro 1913, la jarabono al « Juna Esperantisto » estos 3 fr. (Sm. 1,200), kaj « Lingvo Internacia » kaj « Juna Esperantisto » kune : 7 fr. (Sm. 2,800).

JUS APERIS :

Ĉe la piedoj de la Majstro

DE

ALCYONE (*J. Krishnamurti*)

KUN PERMESO TRADUKITA DE

W. W. MANN

Altspirita verko, kiun ĉiuj devas legi kaj relegi. Ni aŭskultu la parolojn de la Majstro, kaj ni sekvu Liajn ordonojn. Bonege tradukita en klasika lingvo, tiu libro estas ornamo de nia verkaro.

Unu belega volumo 96-paĝa, 10 × 15 cm., artece bindita, ora titolo, luksa papero, kun fotografiaĵo de Alcyone
Fr. 2,50 (S 1).

CHARLES WAGNER

ESTU HOMO !

EL LA FRANCA LINGVO TRADUKIS

Sam. MEYER

Tiu ĉi verko estas plej varme rekomendinda, ne nur pro ĝia alta morala valoro, sed ankaŭ pro ĝia klasika stilo. Tiu libron ne nur legi, sed ankaŭ primediti devas ĉiu Esperantisto.

Unu tre bela volumo 97-paĝa, 11 ½ × 18 ½ cm., lukse broŝurita,
Fr. 1,25 (S 0,50).

Parolado de D-ro L. L. Zamenhof

ĉe la VIII-a Kongreso en Krakovo.

“La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĵus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam — post longa naska preparado — aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpiĝas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Kion signifas dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo, tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre malmultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn laciĝis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience ĵetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniuj kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu pensas, ke li havas rajton de voĉo, ke

li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun meditigas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikiĝante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute nenio diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank'al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano nenio diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tra-

NORMANDA STELO

diciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, — tia lingvo ne bezonas jam timi ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

* *

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne-eminentuloj, mi citos neniun apartan nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van der Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro de ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrablaĵoj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

* *

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari tion tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi « majstron », ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: « tion mi postulas » aŭ

« tion mi deziras ». Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikigo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natūra konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉio, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj ili devas rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu « majstro », ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas tute laŭvola, ke la esperantismo kaj la esperantistoj ne povas esti respondaj pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj.

NORMANDA STELO

Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio nenium el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur *privataĵo*, kiu povas esti *baĝita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identa* kun ĝi.

* *

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: « kiu pli laŭte krias, tiu estas prava ». Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estimon* kaj *konfidon* por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj « espero, obstino kaj pacienco »; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: « konkordo ».

* *

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo mal-agrable seniluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia « kanto de cigno », li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havas por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantismon, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi plu ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkomprenigado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, — tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento kaj ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

* *

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenas, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun versaĵne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo plej koran dankon. Plej koran dankon ni esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona arango de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron."



JUS APERIS :

PLENA Klasika Libro de Esperanto

Tiu ĉi verketo, dediĉita al la gloro de l'genia aŭtoro de l'Fundamento okaze de l'dudek-kvinjara jubileo de Esperanto, enhavas la dek ses oficialajn regulojn de l'gramatiko kaj ĉiujn radikojn ĉu de l'*Fundamento* (Antaŭparolo, Ekzercaro, Universala Vortaro), ĉu de l'*Oficiala Aldono*, kun franca, angla kaj germana tradukoj.

Plej konsciencie ellaborita de S-roj Th. Cart kaj Em. Robert, kaj kun granda zorgo presita de S-ro V. Polgar, ĝi estas vera **juvelo**, kiun ĉiu Fundamentisto, t. e. ĉiu Esperantisto volos posedi.

Pli ol iam, en la nuna periodo, necese estas, ke ni pruvu nian amon al la lingvo, kiun donis al ni D-ro Zamenhof, severe respektante ĝin, t. e. skribante ĉiuj kiel eble plej **klasike**. Grandan helpon por tio alportos la jus eldonita libreto.

Formato 9 × 6 × 0,5 cm. Paĝoj 160. Pezo 30 gram.

Prezo : Kun eleganta fleksebla tolbindaĵo : Fr. 1 (Sm. 0,400) ;

La sama en firma kartona ingo : Fr. 1,25 (Sm. 0,500).

Tiu ĉi verketo estas vendata sen ingo, **nur** kiam oni ĝin aĉetas en nia magazeno, aŭ aĉetas almenaŭ dek ekzemplerojn.

10 ekzempleroj	{	sen ingo, afrankite.....	Fr. 9.50
		kun ingo, »	» 11.50
25 ekzempleroj	{	sen ingo, »	» 22.50
		kun ingo, »	» 27.50
50 ekzempleroj	{	sen ingo, »	» 43.—
		kun ingo, »	» 51.50
100 ekzempleroj	{	sen ingo, »	» 84.—
		kun ingo, »	» 100.—

Presa Esperantista Societo

33, rue Lacépède, Paris.

IX UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Genova — 31^{an} de Augusto — 7^{an} de Septembro 1913 — Genova

Adreso de la Komitato : KONGRESO DE ESPERANTO GENOVA (Italujo)

Nia Sro Stromboli reveninte el la 8^a Kongreso, kortuŝita por la entuziasma akcepto farita al la propono de la Genova Esperanto Unuiĝo por ke la kongreso okazu en Genova, portis al ni 116 aliĝojn al la 9^a, kaj inter ili li portis ankaŭ kelkajn kotizojn jam pagitaj. Tio estas bona komenco kaj por ke la bona ekzemplo estu tuj sekvata la Komitato decidis ke ĝi sendos senpage al ĉiu sendinto de la kotizo de la kongreso (6 Sm. : 15 Frankoj) la gazeton "Itala Esperantisto" komencante de kiam ili sendos la kotizon.

Ĉiuj samideanoj kiuj estos sendintaj la kotizon de Sm. 6 (Fr. 15) al la Komitato de la naŭa Universala Kongreso en Genova (adreso : Kongreso de Esperanto Genova Italujo) ricevos senpage de tiam la gazeton "ITALA ESPERANTO" kiu detale raportas pri la preparoj de la Kongreso.

ROUEN. — La distribution des récompenses aux élèves des cours professés sous le patronage de l'Union Philanthropique des employés de la Ville de Rouen a eu lieu le 12 Octobre. Au palmarès, nous relevons les noms des lauréats des cours d'Esperanto :

1^{er} prix, M. LEMARCHAND. — Médaille d'argent offerte par M. le Préfet.

2^e prix, M. TANIER. — Médaille de bronze offerte par la Chambre de Commerce.

3^e prix, M. FROGER. — Un Volume offert par l'Union Philanthropique.

En outre, M. LEMARCHAND a reçu un prix spécial offert par le Groupe Espérantiste, à l'élève du Cours d'Esperanto ayant donné le plus de satisfaction par son travail.

Sur le même palmarès, nous lisons que notre samideano, M. André DELAFILLE a obtenu le *Diplôme de Comptable*, de la Société Académique de Comptabilité.

Nos vives félicitations aux lauréats.

ROUEN. — A l'occasion du Concours Michelin, le Groupe Espérantiste a offert à la Société Française qui a accepté, cent guides de Rouen en Esperanto, pour être distribués aux lauréats de ce concours.

Oni parolas en ★ ESPERANTO ★

LA VOJO

Tra densa mallumo briletas la celo
al kiu kuraĝe ni iras,
simile al stelo en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.

— Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj
nek batoj de l'sorto, nek moko de l'homoj,
ĉar clara kâj rekta kaj tre difinita
ĝi estas la voj' elektita.

— Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
ni iru la vojon celitan!
eĉ guto malgranda, konstante frapante
traboras la monton granitan.

— L'espero, l'obstino kaj la pacienco
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro
atingos la celon en gloro.

— Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
pri l'tempoj estontaj pensante.

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
ni semas kaj semas konstante.

— « Ho ĉesu! », mokante la homoj admonas,
« Ne ĉesu, ne ĉesu! » en kor' al ni sonas :
« Obstine antaŭen ! La nepoj vin benos,
se vi pacienco eltenos ».

— Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
velkantajn foliojn deŝiras,
ni dankas la venton, kaj repurigita
ni forton pli freŝan akiras.

— Ne mortos jam nia bravega anaro,
ĝin jam ne timigas la vento, nek staro
obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
al cel' unu fojon signita!

L. ZAMENHOF.

Studo pri la Vortfarado de Esperanto

Ac'etebla ĉe Normanda Stelo,
44, strato Vicomté, Rouen.

- Originale Verkita en Esperanto -

DE DOKTORO PANEL

ROUEN

Prezo : som 0,20

(0 f. 50 = 2 respondkuponoj)

BULLETIN D'ADHÉSION

Monsieur le Président du Groupe Espérantiste de

J'ai l'honneur de solliciter mon admission comme Membre de votre Groupe, et vous autorise, si ma demande est accueillie favorablement, à faire toucher par la poste, à mon domicile, la cotisation de la présente année.

Date

Signature :

Nom

Domicile

Ville

P.-S. — Je désire être présenté par MM.

..... qui m'ont donné leur consentement.



Malspritulo ! Neniam ĉe la okulvitra flanko



A.-M. Sonnet
Secrétaire du Groupe Espérantiste

Saint-Pair-sur-Mer (Manche)

POUR RECEVOIR
... FRANCO ...

100 CARTES
DE VISITE

beau bristol

3 lignes d'impression.
et l'étoile ci-contre.
... en vert ...

adresser 2f. 50

à Normanda Stelo
41, Rue Vicomte, Rouen



LETERPAPERO kun la stelo por vizitkartoj
verde presita

100 folioj spm. 0,50 = 1 fr. 25

500 folioj spm. 2 = 5 fr.

LETERKOVRILOJ GLUMARKOJ

kun la granda stelo verde presita

100 kov.. 0,50 = 1 fr. 25 | 500 markoj 1 fr. 25

500 kov.. 2 spm. = 5 fr. | 1000 markoj 2 fr. 50

Normanda Stelo attire l'attention des étrangers sur notre province, elle y amène des touristes. Elle favorise les affaires commerciales par l'Espéranto. Elle ne fait connaître que des maisons dignes de confiance et attire sur elles l'attention spéciale de tous les Espérantistes.

Normanda Stelo se charge de transmettre les abonnements à tous les journaux espérantistes. Elle est à l'entière disposition des syndicats d'initiative pour la distribution gratuite des guides aux Espérantistes.

BULLETIN D'ABONNEMENT

Je m'abonne au Bulletin

Mi abonas la Bultenon

"NORMANDA STELO"

Bulletin Mensuel, Organe de la Fédération Espérantiste Normande

Nom Nomo

Rue Strato

Ville Urbo

Mi sendas la prezon po du frankoj (2 francs) por unu jaro.

A LOUER

L'ÉGLANTINE

82, Rue Jeanne-Darc, ROUEN

COURONNES en tous genres

Fleurs artificielles

PLANTES D'APPARTEMENT

TÉLÉPHONE 472

CHEMISIER

COLOMBE, 72, Rue des Carmes, ROUEN

COUPE & QUALITÉ GARANTIES

Grand choix de Tissus haute nouveauté

CHEMISES SANS BOUTONS

CHEMISETTES SUR MESURE, façon chemisier

Envoi du catalogue sur demande

TÉLÉPHONE 12.60

A LOUER

SENDU du respondhuponojn por ricevi poste unu ekzempleron de

ESPERANTITA GVIDLIBRO EN ROUEN

Desegnaj'oj de J. Gitioud

— 107 pag'oj —

Prezo : 60 centimoj

Vendata de "NORMANDA STELO", 41, rue de la Vicomté, ROUEN

VESTAJOĴ POR VIROJ, JUNULOJ KAJ KNABOJ

THIERY kaj MARTIN 32, 34, 36, Rue de la République
— ROUEN —

—: DRAPOJ, VESTOJ, ĈAPOJ, ĈEMIZOJ :—

LÉGUMES, FRUITS & PRIMEURS

Maison de Commission

L. LEVALLOIS

Propriétaire-Commissionnaire

6 et 8, place de la Pucelle, 6 et 8

TÉLÉPHONE 872

Rouen

Maison L. BERNARD

18, 20, 22, 24, r. Victor-Hugo; 4, r. Alsace-Lorraine

ROUEN

Machines à coudre HOWE

CYCLES & AUTOMOBILES TERROT

Bicyclette POPULAIRE - Automobiles DELAHAYE

Grandes facilités de paiement

— Garage — Atelier de Réparations —

Nous recommandons spécialement à nos sociétaires et à tous les Espérantistes, les commerçants qui nous aident en insérant leurs annonces dans notre bulletin. Toutes les maisons recommandées sont dignes de confiance. Les acheteurs auront toujours avantage à se faire connaître comme Espérantistes à ces commerçants.

"N. S."

A LOUER

Téléphone 7.66

DÉMÉNAGEMENTS

Téléphone 7.66

13^A, Route
de Neufchatel
ROUEN

BIENAIMÉ
GARDE-MEUBLES

Près de la Place
Beauvoisine

"Normanda Stelo", 41, rue de la Vicomté, Rouen

HUILES D'OLIVES D'ITALIE, PROVENÇE, ALGÉRIE, ESPAGNE
REMISE 5 0/0 AUX ESPÉRANTISTES
E. W. SYLVESTER FILS
19, QUAI DU HAVRE, ROUEN — TÉLÉPH. 1204

GRANDE BRASSERIE NATIONALE

33, Rue de la République, ROUEN

Téléph. 950

RESTAURANT A TOUTE HEURE

Téléph. 950

Maison Fuhr LHIRONDEL et KUBIK S^{rs}

51, 53, rue Grand-Pont, ROUEN

ORTHOPÉDIE, BANDAGES, INSTRUMENTS DE CHIRURGIE

Spécialité de Corsets de Toilette pour Dames et Fillettes

GRAND HOTEL BARETTE

Téléphone 2068

JOURNÉE POUR VOYAGEURS

À 6.50 & 7

ÉCLAIRAGE ÉLECTRIQUE

Garçon de Courses

Salons pour Noces et Banquets - On reçoit Touristes en Groupes

ANCIEN M^{ON} LELOUP

35 et 37, Place Carnot (en face la gare d'Orléans) ROUEN

GRANDA HOTELO DE L'GLOBO

LA GEMASTROJ

PARIS — 71, strato Monge

ESTAS ESPERANTISTOJ

Cambroj de 2 ĝis 5 frankoj tage

ELEKTRA LUMO

HEJMA TELEFONO

POMPES FUNÈBRES

Les familles ont intérêt à éviter les intermédiaires, souvent très onéreux, elles peuvent s'éviter sans frais supplémentaires toutes démarches en s'adressant elles-mêmes au Service municipal des pompes funèbres, ou en faisant appeler à leur domicile un employé de ce service. S'adresser

102, rue de la République, Rouen, et 39, rue Benoist, St-Sever. Tél. 187



MAISON
THE HIGH LIFE
TAILLEUR

VOUS SEREZ BIEN
HABILLÉ

6 RUE GRAND PONT

ROUEN

PRIX MODÉRÉS



MAISON SPÉCIALE

LINOLÉUM UNI

et Imprimé

Linoléum Incrusté

LEDRU & C^{ie}

19, Rue de la République
(Coin de la Rue St. Denis)

ROUEN

Papiers Peints

Toiles Cirées

Tapis — Carpettes

Moquettes



CORDONNERIE DU PALAIS
Chaussures de Luxe et de Travail

V^{re} A. HERMEL
1, Rue Rollon, 1 - ROUEN

ESCOMPTE 5 0/0 AUX ESPÉRANTISTES

FOURNITURES GÉNÉRALES POUR CAVES
MACHINES A RINGER ET BOUCHER LES BOUTEILLES
PORTE-BOUTEILLES ET ÉGOUTTOIRS

Porte-fûts robinets, cire, capsules, etc.

Maison DUVAL Frères
V^{re} G. DUVAL et H. SCHEFFER, succ^{rs}

18, rue Alsace-Lorraine, ROUEN. - Tél. 9.54

Ateliers de Fabrication et de Réparation
55, 57, rue des Augustins

A cette adresse : Magasin de vente d'Articles de Laiterie

A LA NOUVELLE MAISON
Anciennement **A LA MAISON D'OR**
54, Rue d'Amiens, 54

A. GORAT
196, 198, 245, Rue Eau-de-Robec - ROUEN

Matelas, couvertures, tapis, vente et achat de mobiliers

MEUBLES Neufs et d'Occasion

AMEUBLEMENTS EN TOUS GENRES

Maison de confiance. — Ne pas confondre

Bien s'adresser à la « **NOUVELLE MAISON** »

MACHINES A BRIQUES
ET CALIBREUSES

Maison C. LAPIERRE
Henri CATHERINE, Successeur

39, rue du Faubourg-Martainville
près le Champ-de-Mars

— **ROUEN** —

Grands Magasins DU LINGOT D'OR

60, 62, 64, rue du Bac et rue des Fourchettes, ROUEN

Nouveautés, Ameublements en tous genres, Confections pour hommes et jeunes gens, pour dames, fillettes et enfants, Chaussures, Chapellerie, Lingerie, Bonneterie et Parapluies. Articles de Chauffage et d'Eclairage, Faïence et Porcelaines, Horlogerie, Bijouterie et Glaces.

Capital 60 millions **CRÉDIT DU NORD** 15 millions versés

SIÈGE SOCIAL A LILLE

SUCCURSALE DE ROUEN, 68, rue Jeanne-d'Arc (en face la Poste)

Escompte et Banque. — Achats et Ventes de titres. — Paiements de tous Coupons. — Location de Coffres-forts depuis 5 fr. par mois. — Garde de Titres.

Grand assortiment de Nattes,
Chignons mode bouclés et nat-
tés, Crépons réclame Cheveux
premier choix. Parfumerie à
prix très réduits

MAGASIN DE CHEVEUX
A^{me} Maison MARTIN, P. JEAN, Succ^r

15, rue Grand-Pont, ROUEN - TÉL. 68

Garage Robert CROIS
ROUEN

Rue du Donjon (Tour Jeanne-Darc)

TÉLÉPHONE 1317

Agence BERLIET-PANHARD
Pneus MICHELIN

A LA VILLE DE LIMOGES
Ch. VILLOUTREIX, 29, rue Écuyère

Grand choix de Porcelaine riche et
ordinaire, à des Prix très modérés. —
Services de table, à Dessert, à Gâteaux,
à Fraises. — Services à Café, à Thé, à
Liquieur. — Déjeuners, Tête à tête, Sta-
tuettes, Vases, etc.

SPÉCIALITÉ de BLEU DE SÈVRES et INCRUSTATIONS

"Normanda Stelo", 41, rue de la Vicomté, Rouen

GRANDS MAGASINS DE NOUVEAUTÉS AU SANS PAREIL

ROUEN -:- 7, 9, 11, 13 et 15, rue des Carmes -:- ROUEN

Les Grands Magasins AU SANS PAREIL de ROUEN n'ont aucune Succursale à Rouen ni dans la banlieue

CHARBONS

22, rue Jeanne-d'Arc, ROUEN, Téléph. 20.45

BOULETS

A. Lemoine & ses Fils

pour

seuls fabricants des

foyers domestiques

BOULETS OVOÏDES LEMOINE

Marque A. L.



A LOUER

AUX AUTOMOBILISTES !

USINE DE RÉPARATIONS DE PNEUMATIQUES DU CHAMP-DE-MARS

OUTILLAGE PERFECTIONNÉ 9. Boulevard Gambetta, 9 Téléphone 15.20

Usine à vapeur, électrique et hydraulique. Réparations défiant la concurrence d'enveloppes éclatées et chambres à air
Réchapages anti et lisses. — Achat de déchets "Chambres à air"

TROUSSEAUX & LAYETTES

Spécialité de Toiles

M^{on} Lucas-Leclin

Lingerie fine

Linge de Table . . .

Mouchoirs

CH. LUCAS, SUCC^r

11, rue du Change - 12, rue Grand-Pont. — ROUEN

MAISON SPÉCIALE POUR NOCES & BANQUETS
SALON DES FAMILLES, LEMONNIER, Cuisinier-Traiteur Téléph. 5.25

33, boulevard Beauvoisine, 33. — ROUEN

GRANDE SALLE DE FÊTES — SALONS pour Sociétés et réceptions — DINERS — SOIRÉES
Restaurant à la Carte - Menus très soignés depuis 5 francs - EXPÉDITIONS pour tous pays

Les Gérants: LIÉBARD, LEROUX.

Imprimerie BLONDEL, 21, rue Cauchoise à Rouen.